



Kulturaj Kajeroj

E. MAHE →

DUMONATA INFORMADA KAJ KULTURA REVUO

Direktoro : H. MICARD, Prezidanto de la Kulturdomo de Franclandaj Esperantistoj, ÉPINEUX LE SEGUIN (Mayenne) - Tél. 1 - (Francujo)

J A R A B O N O :

Sendotaj al : Micard Henri

Simpla : 5 fkoj / Kulturaj kajeroj

Bonfara : 10 fkoj / Epineux-le-Seguin (Mayenne)

C. C. P. Nantes 2349-62

(Vidu la liston de niaj perantoj sur paĝo 4)

SEPTEMBRO - OKTOBRO

1964

5

KULTURAJ KAJEROJ

1964

Septembro - Oktobro

Dumonata informada kaj kultura revuo

REDAKCIA KOMITATO :

Sekretario :

P. Babin, 5, boulevard Buisson
Rochefort-sur-Mer (Franc.)

Komitatanoj :

Paul Guillot
Frédéric Thébaud
Pierre Chevalier

La represo de artikolo el nia revuo estas permesita post interkonsento kun la redakcio. Oni bonvolu ĉiam citi la nomon « Kulturaj Kajeroj » kaj sendi ekzempleron de la revuo aŭ gazeto en kiu aperis la koncerna represaĵo.

ENHAVO

Esperantista Somero.

Esperanto tra la mondo.

Kelkaj notoj pri Andoro.

Kiel resti juna ? (S-ino Roose).

Pri fonetiko (D. Dalmaŭ).

Brigo estas sporto.

Gravaj datrevenoj.

Kara hundo (A. Ĉekov).

Nia konkurso.

Gramatiko per bonhumoro.

KULTURAJ KAJEROJ

ne similas, ne similos al aliaj Revuoj.

KULTURAJ KAJEROJ

spuglos la vivon de nia Esperantista Kulturdomo.

KULTURAJ KAJEROJ

publikigos la plej gravajn prelegojn aŭditajn de niaj vizitintoj, kaj artikolojn de diverslandaj eminentaj esperantistoj.

KULTURAJ KAJEROJ

respondos al gramatikaj demandoj.

KULTURAJ KAJEROJ

prezentos konkursojn, kaj diversajn amuzaĵojn.

Ni deziras ke « **Kulturaj Kajeroj** » plaĉu al vi. Sendu viajn sugestojn, kaj kritikojn

H. MICARD.

Esperantista Somero

El ĉiuj horizontoj alfluis la homoj al Hago, por sin bani en esperantista medio. El preskaŭ ĉiuj landoj de la mondo venis al Nederlando viroj, virinoj, gejunuloj kaj infanoj por certigi al la dubemuloj, ke Esperanto estas vivanta lingvo. Dumil kvincent homoj ! Kiuj neesperantistaj internaciaj kongresoj grupigas tiom da diverslandanoj ? Kiu kunvenigas tiel grandan nombron da samlingvanoj ? Neniu. Kaj la plimulto el tiuj kongresanoj ne kontentiĝis per tiu unusemajna kontakto sed ankaŭ vizitis aliajn kongresojn (Gröningen, Valencio, Narbono), la antaŭkongreson de Bruselo, aŭ restis por la post-kongreso, aŭ eĉ longigis la vojaĝon hejmen vizitante amikojn en aliaj landoj. Pluraj vizitis antaŭ aŭ post la Universala Kongreso, la Esperantistan Kulturdomon.

Kio do okazis en Grésillon ? La kvar someraj periodoj estis diverse vizitataj. Plej sukcesaj, kiel kutime, estis la Kulturaj kaj Turismaj Internaciaj Ferioj, en Julio, kaj la Esperantistaj Semajnoj, en Aŭgusto.

La Internaciaj Ferioj kunvenigis sesdekon da partoprenantoj kiuj interesplene aŭskultis S-ron ROOSE kiu parolis pri « La evoluo de la arto de post la Renesanco » ; S-inon ROOSE kiu montris, ke, kvankam la homi ne povas uniĝi, li, ŝi povas almenaŭ konservi siajn mensajn kaj korpajn kapablojn ; S-inon ROUX, kiu promenis ĉiujn tra Saharo kun la nomadoj ; S-inon CHEVERRY, kiu pritraktis temon de ŝi multe ŝatatan : « Anĵuo kaj ĝia loko en la franca vivo ». La aŭskultantoj plurfoje fariĝis ekskursantoj vizitante la kastelojn de la Loire-valo, la

artan urbon Angers kaj la zoologian ĝardenon en La Flèche. Ili ankaŭ fariĝis spektantoj ĉe Le Lude, mi:plene ĉeestantaj la belegan noktan spektaklon sur la bordoj de la rivero Loir.

Dum la Esperantistaj Semajnoj la etoso estis malsimila. Tutaj familioj ĉeestis (ĉu oni ne kalkulis dek ses infanojn samtempe restadantajn ?). La tri esperanto-kursoj estis sekvataj de vere bonaj, atentaj, diligentaj ĝelernantoj diversaĝaj kaj diverslandaj. Multaj ankaŭ kunportis hejmen la librojn, kiujn ili mem bindis kaj la elegantajn korbojn, kiujn ili mem faris. Profitante la belan veteron ĉiuj ĉiutage banis sin, multaj pilkludis, kelkaj fiŝkaptis kaj ĉiuj laboris. La sukcesoj ĉe la finaj ekzamenoj estis tute kontentigaj, kaj ni tre ĝojas anonci, ke du samideaninoj sukcese provis la Grezijonan ekzamenon, la Internacian Ateston pri Kapableco. Ni multe gratulas S-inon Gisela Braun, el Frankfurt (Germanio) kaj S-inon Kerttu Vaatanen, el Lappeenranta (Finlando), kies provaĵoj elmontris kapablojn ne nur pri la praktikado de la lingvo sed ankaŭ pri la taksado de esperantaj tekstoj.

Kaj nun jam ĉiuj deĵorantoj en la Kulturdomo preparas la 1965-ajn aktivajn. Ni povas anonci, ke S-ino Emilija Lapenna versajne, prelegos okaze de la Internaciaj Ferioj (25-an de Julio-8-an de Aŭgusto). La interesatoj povas de nun peti la ĝeneralajn informojn kaj pli detala programo baldaŭ aperos.

Kiujn el vi ni havos la plezuron bonvenigi en 1965 ?



Li povas kapti ĉiun okazon

legi sian ŝatatan revuon

KULTURAJ KAJEROJ

ĉar li jam abonis ĝin.

Vidu adreson en Francio sur la unua kovrilpaĝo,

kaj la listo de niaj perantoj sur la lasta.

Esperanto tra la Mondo



La Universala Kongreso en Hago

Ĉi kunvenigis 2.512 reprezentantojn el 43 landoj. Oficialaj delegitaroj alvenis el Sovetunio, Ĉinio kaj grandaj grupoj el plej diversaj landoj. La Kongreso pritraktis interalie ampleksan raporton pri la eduka valoro de Esperanto precipe kiel baza lingvo kiel enkonduko al aliaj fremdaj lingvoj. La Komitato de Universala Esperanto-Asocio elektis novan estraron sub prezido de Prof. I. Lapenna de la Universitato de Londono.

La Universala Kongreso okazos en Tokio en 1965, kaj en Budapeŝto en 1966.

El Sovetunio

La duan jaron soveta delegacio ĉeestis la U.K. S-ro Stepan Titov, patro de la dua kosmonaŭto, gvidis tiun delegacion de dekdu personoj.

— Por 1965 estas anoncitaj la eldonoj de du ampleksaj vortaroj rusa-esperanta kaj esperanta-rusa, kaj de nova lernolibro. Kiam antaŭ kelkaj monatoj aperis brajla lernolibro de Esperanto por rusaj blinduloj, la tuta eldonkvanto estis tuj forvendita, kaj dua eldono estas postulata.

— Esperanto-sekcio fondiĝis en la kadro de la Societo por Amikeco kun Eksterlando.

El Aŭstralio

Nova elementa-mezgrada lernejo en Wellington, ĉefurbo de Aŭstralio, estas inter la 27 lernejoj de tiu lando kiuj lastatempe decidis inkluzivi la Internacian Lingvon en siajn lerno-programojn. Jam antaŭ la finkonstruo de la nova lernejo, ĝia estro, S-ro J.A. Taylor, decidis fari la lernadon de Esperanto deviga por ĉiuj lernejoj. Kiam la lernejo atingos sian plenan amplekson en 1965, 620 infanoj inter 10 kaj 13 jaroj lernos tie la Internacian Lingvon.

— La unua esperanto-strato en Aŭstralio estis inaŭgurita en Redcliffe, apud Brisbane.

Venontaj renkontiĝoj

— La Eŭropa Esperanto-konferenco okazos en Vieno, de la 11-a ĝis la 17-a de Julio 1965, kun interesa programo kaj belaj ekskursoj. Adreso : Aŭstria Esperantista Federacio, Wien XV, Fünfhausgasse 16.

— Kun la temo : « Ŝtato kaj Ideologo » okazos en Nürnberg de la 27-a de Decembro ĝis la 3-a de Januaro, la 8-a Seminario de Germana Esperanto-Junularo. Prelegos inter-aliaj P-ro Laurat el Parizo, kaj S-ro Ivo Osibov el Split. Pro-

mesis ankaŭ prelegi D-ro Lapenna. Tre favoraj kotizoj, speciale por gejunuloj malpli ol 25 jaroj. « Silvestra » balo kaj ekskursoj preparataj. Adreso : Germana Esperanto-Asocio Poŝtfako 2113, 85 Nürnberg 2, Germanio.

Belarta Konkurso 1965

U.E.A. invitas, kiel ĉiujare, la interesatojn partopreni la Belartan Konkurson. Ĉiuj informoj aperas en la Oktobra numero de « Esperanto ». Nova adreso por sendo de la konkursaĵoj : S-ino Emiliĵa Lapenna, Nova Ves 32, Zagreb, Jugoslavio.

Novaj interesaj eldonaĵoj

— Malmultekosta 15-minuta disko « Internacia Elparolo », leĝaĵoj de la kvin diversnaciaj, kiuj laboras en U.E.A.

— Grandformata longdaŭra disko « Ni kan-
tu en Esperanto » liverita kun tekstoj. Eldonita en Usono.

— Libreto « Nederlando » kun tre belaj koloraj bildoj.

— Luksa eldonaĵo « Enciklopedieto Japana ». Difinoj pri la tuta japana civilizacio kaj vivo kun multaj bildoj.

— « La Esperanta Novelarto », 33 rakontoj. Redakto de R. Rosetti kaj Szilagy.

— Aperis la dua parto de Plena Gramatika.

Novaj fakaj Asocioj

— « Muzika Esperanta Ligo. S-ro G.B. Briano, Via Saporiti N. 8-11, Genova, Italio.

— Filologia Sekcio. S-ro L. Marikin, str. Dimo h, Dimov 53, Sofio 6, Bulgario.

— Internacia Astronomia Asocio. S-ro W. Murawski SUPO 10 425, University of Arizona, Tucson, Arizona, Usono.


— Internacia Klubo de Aŭtomobilistoj-esperantistoj S-ro Jaumotte, de Bruynlaan 44, Wilrijk, Antverpeno, Belgio.

Famekonatan francan brandon KON-JAKO disvendas s-ano Despeyroux, reprezentanto, 200, rue Faub. St. Denis, Parizo 10. Aŭtentikeco kaj altkvalito garantiataj. Ekspedo en ĉiujn pagipovajn landojn. Informpetu !

Francaj departementoj en la karaiba Maro

La Francaj Antiloj

Tiu parto de la franca teritorio etendiĝas inter Porto Rico kaj Venezuelo. Ĝi entenas plurajn insuletojn — Les Saintes Marie Galante, La Desirade, St Barthelemy, du trionojn el St Martin — kaj du pli grandajn insulojn : La Guadeloupe kaj La Martinique. La pejzaĝoj restis tiel mirindaj, kiel ili estis, kiam, antaŭ tri cent jaroj, tie elŝipiĝis la unuaj normandaj okupantoj. Sed nun, iom post iom, modernaj konstruaĵoj anstataŭas la malnovajn ligno-kabanetojn.




La ĉefa riĉaĵo de tiuj insuloj estas la suker-kano. La Antiloj estis dum tre longa tempo la nura suker-provizisto de Francujo, sed la kan-sukeron grave konkurencis la bet-sukero. El la suko de la suker-kano oni ekstraktas alkoholaĵojn : la rumon. En la lastaj jardekoj la konsumado de la rumo malpliigis en Francujo pro la disvastiĝo de aliaj francaj aŭ eksterlandaj alkoholaĵoj. Pro tio la antilaj industrioj devis koncentrigi kaj modernigi. Oni plibonigis la kvaliton de la rumo kaj plimultigis ĝiajn uzojn. Pro tio nun la konsumado de la rumo pli grandigas.

Alia riĉaĵo estas la banana. Centoj da malgrandaj kaj grandaj banankampoj produktas fruktojn ŝatatajn de la francoj kaj de eksterlandanoj. Ankaŭ la produktado de ananasoj disvastiĝas; oni sendas la ananasoj al Parizo per aviadiloj. Sed gravaj ciklonoj detruis en 1963 kaj 1964 grandan parton el la plantejoj.

Sed ankoraŭ mankas en la insuloj taŭga turisma organizo. La franca kuirarto altiras ĉefe la amerikanojn sed mankas la komfortaj hoteloj ; almenaŭ ili ne estas sufiĉe multaj. Bedaŭrinde, ĉar multaj francoj el la kontinento ŝatus koni tiujn departementojn, pri kies milda klimato ili ofte revas kaj kiujn ili povas atingi post nur ununokta flugado.





Kiel resti juna ?

(Resumo de prelegoj faritaj de
de Sino Roose el Brugge,
en la Esperantista Kulturdomo — Julio 1964)

La statistikoj montras, ke la homoj iĝas pli aĝaj. Antaŭ ankoraŭ ne unu kaj duona jarcento la meza vivdaŭro de la homo estis la duono de la nuna. La kaŭzo de tiu fenomeno estas la progreso de la medicino kaj de la higieno. Sed tiu ĝojiga fakto ankaŭ estigis novan problemon : kiaj estos tiuj jaroj, kiujn oni vivos plu ? Imagu la tempon de la maljuna aĝo kun malsanoj, kun paralizitaj korpomenbroj, kun ne plu klara menso. Imagu ke en tiu lasta vivoperiodo oni estas ŝarĝo por hejmanoj. Kia malĝojiga antaŭvido !

Multaj kuracistoj komencis pensi pri tio, kaj ekestis nova scienco : la geriatro. Notu bone ke estas eraro klopodi por pli juniĝi. Tio estas neeble. La maljuniĝo estas normala evoluo. Oni devas strebadi al la malrapidigo de la procedo de maljuniĝo, do, resti kiel eble plej longtempe vigla, eleganta, bonfarta, ktp. Mia celo estas montri, ke oni fakte povas malrapidigi tiun procedon de maljuniĝo. La ĉefaj kondiĉoj estas volo, kaj iom frua lernado (plejlaste ĉirkaŭ la 40-a jaro). La rimedo konsistas el multaj sed malgrandaj aferoj.

Oni devas ja fari distingon inter korpa kaj spirita viklecoj. Pri tiu lasta mi nun ne volas insisti. Cetere ĝi tre malsimilas de persono al persono. Grava afero estas, ke oni konservu interesigon en la evoluo de la vivo kaj de la okazantaĵoj. Tial oni devas daŭre legi gazetojn ; ne tiom pro la rakontado de la murdoj kaj akcidentoj, kiom pro la diversaj artaj kaj sciencaj kronikoj, pro la decidoj de ekonomiaj, politikaj kaj administraj instancoj. Oni legu plu librojn, ĉu informajn ĉu literaturajn. Ili rivelas al ni la kaŝitan psi-

kan evoluon de nia tempo, de nia homaro. La pliaĝuloj ne apartigu sin de la socio ; ilia interesiĝo restu vigla kaj diversflanka ; ili kapablu ankoraŭ juĝi, tiel ke iliaj konsiloj restu valoraj.

Por konservi korpan viklecon oni malhelpu la dikiĝon. Oni devas resti sana. Tio signifas ne sur kontraŭbatali malsanojn sed ankaŭ prevente zorgi, ekz. per vizitoj al kuracisto. Nu, la dikiĝo estas danĝera. Ne pensu, ke ĝi estas normala. Ekzistas kompreneble patologia dikiĝo. Sed alia formo de dikiĝo estas evitebla. Ĝiaj kaŭzoj estas preskaŭ ĉiam : tromangado kaj trotrinkado. Je certa aĝo oni nur tre escepte povas profiti dolĉaĵojn kaj abundan manĝon de pastoj, pano, terpomoj. La manĝado de fruktoj kaj legomoj povas ĉiam okazi en iom granda kvanto. Mi ne povas tion pritrakti detale tie-ĉi ; sed troa manĝado kaŭzas amasiĝon de tro da grasoj, kaj tiuj malhelpas la sangofluon. El tio sekvas ne bona funkciado de koro kaj pulmoj, kiuj devas fari kromlaboron. Ni ankaŭ ne forgesu ke la sango devas, ĝis la plej ekstremaj partoj de la korpo, alporti la fortigajn substancojn. Ĉu estas necese insisti pri la aspekto de dikiĝinta persono ? La ĝenerala fleksebleco foriris ; ankaŭ la svelteco ; la teniĝo ŝanĝiĝis, ktp.

Por konservi sian korpon sana oni devas konservi ĝin pura. Estas necese lavi sin tre ofte pro du kialoj : la haŭto spiras kaj tra ĝi foriras malutilaj materioj. Kaj per broso oni devas purigi sian korpon ! Plie la lavado helpas ankaŭ la sangofluon kiu estas plej grava. Pro samaj motivoj estas bone naĝi, preni duŝojn, ktp. Ankaŭ ne neglekti la zorgojn pri

la ungoj de manoj kaj piedoj. La sekvoj de malzorgoj tiurilate estas sufiĉe evidantaj.

Principo devas esti, ke nur estas permeataj tiaj vestaĵoj, kiaj subtenas la membrojn kaj organojn, ne tiaj, kiaj premas ilin. Tiuj kiuj superfluigas aŭ eĉ malhelpas la laboron de la muskoloj estas kondamnendaj. Nepre ! Do, for la korseto, kiu estas kiraso. Certe nun multaj faras al si sekrete la demandon : « Kion fari por kaŝi mian iom dikan ventron ? » La respondo estas : « Gusta nutrado kaj ekzercoj. » Grava estas ankaŭ la portado de facilaj ŝuoj por via teniĝo, via marŝmaniero, ktp. Nenion porti kio ŝnuras kolon kaj brakojn aŭ krurojn.

La tuta korpo kaj ĉiuj muskoloj bezonas ĉiutagan laboron kaj moviĝon. Ter-kaj aliaj laboristoj ofte pensas, ke ilia korpo estas en sufiĉa moviĝo. Tion pensas preskaŭ ĉiuj dommastrinoj, kiuj ja devas balai, froti, laŭvi, ktp. Tamen plejparte estas nur parto de la korpo aŭ de la muskoloj kiu laboras, ne ĉiuj. Tial adekvataj sportoj estas necesaj, adaptitaj al la persono, kaj sub kontrolo. Mi jam aŭdas vin : « Por tio mi ne havas tempon ». Ankaŭ por tio vi havas, tempon, se vi vere volas kaj se vi estas konvinkita pri la neceso. Klopodu trovi amikinojn kiuj deziras kun vi regule praktiki iun sporton, ekz. volley-ball ludon. Ĉambrogimnastiko estas ankaŭ tre rekomendinda. Sed vi ne sufiĉe pripensas, ke via ĉiutaga vivo donas al vi tiom da eblecoj por resti moviĝanta kaj vigla persono. De tempo al tempo kuru anstataŭ iri. Dancu iomete, kiam vi aŭdas belan muzikon eĉ la radio. Iru foje per saltetantaj paŝoj. Kiam vi supreniras ne uzu la manreilon. Kiam vi devas ion preni de la grundo, genefluksu. Prenu pilkon ĵetu kaj kaptu ĝin. Prenu necesan objekton per manoj malantaŭ la dorso kaj turnu la kapon por observi kion vi faras. Ekzistas mi ne scias kiom da tiaj okazoj. Ĉiuj helpas.

Ni bezonas proteinojn, kiuj estas la konstru-ŝtonoj de la korpo. Ili estas la solaj materioj, kiuj donas al la organismo la nitrogenon necesan por la asimilado. Ankaŭ ili posedas amino-acidojn, kiujn la organismo mem ne kapablas produkti. Do, oni devas preni ilin de ekstere per la nutraĵoj. En normala nutrado oni potage bezonas proksimume 60 gramojn da proteinoj. Due, ni bezonas karbonhidratojn, kiuj donas la energion. Tria, ni bezonas grasojn, kiuj protektas kaj enordigas la varmon de la korpo. Ni bezonas ankaŭ mineralajn salojn kaj akvon. Fine, sed ne laste, tre gravas la vitaminoj. Principe la vitamino C estas nepre necesa por la formado de la ostoj, dentoj, kaj eĉefe kontraŭ infekcioj. El manko da ili rezultas malpliigo de korpa kaj intelekta efiko. Bedaŭrinde oni tro ofte mortigas ilin per bolado de nutraĵoj. Feliĉe la fruktoj provizas nin per ili kaj oni ne povas preni tro da ili. Veraj fontoj estas la citronoj kaj oranĝoj. Pri la nutrado ekzistas multegaj kaj facile kompreneblaj eldonaĵoj. Espereble via scivolo estas vekita.

Oni devas pretigi sin por tiu venonta periodo de maljuniĝo. Tiam oni estas pli trankvila pli bonhumora. La vivo ŝajnas kaj ŝajnos pli valora kaj pli vivinda. Ĉio tio ne estas garantio, ke la maljunaĝo estos feliĉa. Sed oni plimultigas la ŝancojn de feliĉa maljunaĝo. Tro multaj personoj ankoraŭ ne komprenas tion. Ni ankoraŭ ofte devas prediki en dezerto. Sed mi ne dubas, ke almenaŭ vi, legantoj, komprenas la necesecon resti kiel eble plej longtempe junaj, agreblaj, belaj, sveltaj — ankaŭ por viaj ĉirkaŭantoj : edz (in) o, infanoj, geamikoj, — kaj valoraj kaj signifoplenaj eĉ en relative alta aĝo.

H. ROOSE — de KERSGIETER.



Kelkaj notoj pri...

ANDORO



La vilaĝo... ĉefurbo Andoro la Malnova

Rajdanta la Centrajn Pireneojn, inter la francaj departementoj « Pyrenées Orientales » kaj « Ariège », kaj la hispanaj provincoj « Gerona » kaj « Lerida », etendiĝas la lando Andoro, en spaco de 560 kvadrataj kilometroj, ĉirkaŭata de altaj montaroj. En la sovaĝaspekta naturo loĝas 5.500 homoj dispartigitaj en pluraj vilaĝoj situantaj je alteco de almenaŭ 900 metroj. La ĉefurbo estas Andorra-la-Vella, la plej malnova paroko en la lando.



Tipa Kostumo

La klimato estas sufiĉe milda en la malaltaj lokoj, sed la neĝo ŝtopas la intermontojn de Novembro ĝis Aprilo. La norda vento « kiu tragike ploras sub la pordoj » balaas la valojn. Sed la printempo kaj la somero naskas belajn florojn sur la deklivoj kaj kantigas la akvojn kaj la grilojn ; la pejzaĝoj fariĝas grandiozaj. En Septembro la vivo iom post iom malvigligas kaj la gregoj hejmeniĝas por atendi la renaskiĝon de la naturo.


Krom naturaj kaj artefaritaj herbejoj kaj legomkultivejoj oni trovas en arbaroj tre diversajn arbo-specojn : kverkojn, fraksenojn, poplojn, betulojn, abiojn kaj larkojn. La riveroj kaj la belegaj lagetoj estas fiŝabundaj. La bredado estas la ĉefa riĉaĵo de la andora agrokulturo kaj oni alklimatigis grandan kvanton da dombestoj : mulinojn, bovinojn, azenojn, ŝafojn, kaprinojn kaj porkojn. Sed ankaŭ sovaĝajn bestojn oni renkontas : la brunan urson timatan de la paŝtistoj, la apron malŝatatan de la terkulturistoj, la gracian ĉamon, la leporon kaj la perdrikon.

Jam ĉe la unuaj tempoj de la homaro Andoro estis enloĝata kion pruvas objektoj el la epoko de la polurita ŝtono kiujn oni tie trovis kaj menhiroj videblaj en kelkaj lokoj. La Maŭroj okupis la landon, kie ili postlasis grandnombrajn signojn pri sia paso. Oni montras al la turistoj la trogon de la ĉevalo de Karlo la Granda, kiu trairis la valojn postkurante la Saracenojn. Multaj konfliktoj estigis pri la posedo de tiu lando inter la episkopoj de Urgell (Hispanio) kaj la gento de Foix (Francio). Nur fine de la 13-a jarcento oni subskribis akton nomitan « Parraĵto » por reguligi la rajtojn de ambaŭ partioj. Ankoraŭ nuntempe la politika statuto de la Andoraj Valoj estas inspirita de tiu Parraĵto. Laŭ tiu akordo la grafoj de Foix kaj la episkopoj de Urgell ricevis definitivan konfirmon pri siaj feŭdoĉefeco kaj privilegioj. Ĉiun duan jaron ili rajtas postuli tributon de sia vasalo. Ili rajtas edikti ordonojn kaj surpreni la tirolon « Kunprinco ». Dum la rajtoj de la episkopoj de Urgell transdoniĝis ĉe ĉiu elekto al la posteulo, tiuj de la grafoj de Foix herede venis al la reĝo de Navarre Henriko la 4-a, kiu alportis tiun floretan al la krono de Francio ; kaj pro tio nun la feŭda titolo « Kunprinco kaj feŭdoĉefo de Andoro » kuŝas sur la tre demokrata kapo de la Prezidanto de la Franca Respubliko.

Sekve de siaj malfacilaj rilatoj kun la eksterlando de sia neriĉa grundo, kiun neniu invadanto povus deziri, Andoro restis sama, dum en Eŭropo fariĝis kaj malfariĝis la regnoj. Tamen la liberamaj ideoj de la Franca Revolucio penetris ĝis ĝi. Ĉis tiu tempo la aŭtoritato apartenis al la « Konsilio de la Tero » balotita ĉiun duan jaron, de la limigita voĉdonado de la fameliestroj. Sed kompreneble la junaj Andoranoj nevolonte obeis tiun Konsilion. Post manifestacioj, reform-projekto estis prezentita al la Kunprincoj sed pro malinklino de Napoleono la 3-a al tiaj problemoj, la projekto, post enruĉo de gravaj modifoj, estis definitive akceptita en 1868. Nur en 1933, post nova kampanjo de la « Andora Junularo », la limigita voĉdonado estis anstataŭigita per universala voĉdonado ; nun, rajtas voĉdoni ĉiuj virseksaj andoranoj pli ol 25-jaraj ; estas elakteblaj ĉiuj Andoranoj

pli ol 30-jaraj kiuj, nek kriplaj, nek drinkemaj, posedas sufiĉe da bienoj por eventuale kompensi malprosperan administradon de la publikaj aferoj.

Granda evento estis la konstruado de la nacia vojo traŭranta la valojn ek de 1934. La ĝis



La Kapelo de Sant Miquel de Engolasters

tiam misterplena lando fariĝis pli facile alirebla kaj la vivkondiĉoj de la loĝantaro multe ŝanĝiĝis. Granda hidro-elektra uzino konstruita dank'al francaj kaj hispanaj kapitaloj, alportis komforton. La dissendilo Radio-Andorra, inaŭgurita en 1939 konigis Andoron. Ĉiuj tiuj modernigoj permesis al la lando profiti de nova industrio : turismo.

Kompare kun la kataklismoj, kiuj konfuzeigas la mondon, la historiaj eventoj en Andoro ŝajnas neampleksaj. Sed ĉu feliĉa popolo ne estas tiu, kies historio estas seneventa ? Ĉu ne estas preferinde, ke en la historio de popolo paŝoj restu blankaj anstataŭ esti makulitaj per sango ?



La ŝafoj transmigras al la altaj paŝtejoj

El « La Kunprinclando Andoro, lasta feŭda ŝtato » — eldonita de « Esperantaj Francaj Eldonoj » — aĉetebla ĉe nia Libro-Servo, (Kliŝoj de E.F.E.).

GRAVAJ DATREVENOJ




Antaŭ 90 jaroj naskiĝis en Oxford

Winston CHURCHILL. — La « granda maljunulo » fariĝis deputito en la angla Parlamentejo en 1900, post tumulta vivo kiel oficiro en Kubo, Hindio kaj Afriko. Li poste okupis la plej multon el la gravaj ministro-oficoj. Lia influo estis granda dum la Unua Mondmilito, kiam li estis Ministro de Maristaro kaj poste Ministro de Armado. Antaŭ la Dua Mondmilito li batalis kontraŭ la politiko pri eksterlando de Britujo. De 1940 ĝis 1945, kaj de 1951 ĝis 1955 li estis ĉefministro kaj gvidis la sorton de sia lando.

Antaŭ 75 jaroj naskiĝis en Allahabad

Jawaharlal NEHRU. — Li devenis de distingita bramana familio. Li estis studento en Harrow kaj Cambridge kaj fariĝis advokato. Li estis membro de la komitato en la Nacia Kongreso en 1918 kaj fariĝis arda disĉiplo de Gandhi. Li estis plurfoje kondamnita je malliberejo pro rezisto kontraŭ la brita superregado. De 1947 ĝis sia morto, en 1964, li estis ĉefministro de Hindujo.



Antaŭ 25 jaroj mortis en Londono

Sigmund FREUD. — La fondinto de psikanalizo studis en Vieno, Parizo kaj Nancio kaj fariĝis profesoro en Vieno en 1902. La metodo kiun li disvolvis kondukis al nova kono de la psika vivo. Dank'al li la nocio de nekonscio estis akceptita en psikologio.

BRIGÒ ESTAS SPORTO

Ĉiu bone scias, ke streĉa cerbumado pli ol praktikado de korpaj aktivajoj, elĉerpas la homajn fortojn. Nu, kial do ni neniam vidas rezultojn de brig-maĉoj en la sportaj rubrikoj? Pri brigò ekzistas, same kiel pri ĉiuj aŭtentikaj sportoj, naciaj kaj internaciaj konkursoj. Ankaŭ tiaj maĉoj necesigas trejnadon, teknikajn studojn, teamajn sentojn, bonan menso-staton*; kaj, ofte okaze de gravaj konkursoj la brigantoj observas taŭgan dieton. Oni eĉ asertas, ke la korpa lacego de brig-ĉampiono estas pli granda post unusemajna konkurso ol tiu de biciklisto post unumonata konkurado. Fakte, post plej intensa ludo, futbal-maĉo ekzemple, la ludintoj plene ripozas, kaj ĝenerale tre rapide, dum la cerbo de briganto funkcias longtempe post la fino de la turniro; kaj daŭre konsumas la rezervojn de la ludinto.

Same kiel futbalo, brigò postulas regulojn, trejnistojn, kapitanojn kiuj, antaŭ la maĉo, starigas planon, kalkulante pri la tiamaj kapabloj de la kontraŭ-batalantoj, kaj, kvankam bona brig-ludanto pli pasie luktas per sia cerbo, li ankaŭ luktas per siaj korpaj fortoj. Evidentiĝas, ke brigò estas sporto, kiel iu ajn alia. Aliparte ĝi postulas edukadon tro ofte preterlasitan, koncentradon, atenton — necesajn por ŝak-ludado kun kiu ĝi havas multajn komunajn punktojn — sed ankaŭ bonegan memoron, observemon, ian talenton pri analizo kaj psikologio. Certe grandan ĝuon ricevas la atleto, kiam brile venkinta li paradas, sed multe pli intensa estas la kontenteco de tiu, kiu superis samvalorajn konkursantojn dank'al peniga cerbumado. Tamen ambaŭ agadoj same la cegas la korpajn kaj postulas talenton, kapablecon, daŭran trejnadon. Verdire, ne ĉiuj fut-

balistoj elmontras sufiĉe da rezonemo kaj analizemo. Ofte, al ŝak-ludanto mankas imag-povo, ideoj; al brig-ludanto korpa kaj teknika fortoj. Ne ĉiuj sportuloj sufiĉe prizorgas pri la korpa stato, la teamaj sentoj, anticipaj juĝoj kaj... bona moralo. Estas futballudantoj, kiuj blinde kuras al la balo, ŝak- aŭ brig-ludantoj kiuj kalkulos nur pri la bonŝanco. Ili ne povas konsideri tiujn diversajn ludojn kiel sportojn, sed nur kiel hazardajn ludojn.

Vera sportulo, aparte vera sportama brig-ludanto, pensas, analizas, deduktas kaj fine lia tekniko — kial ne lia scienco? — venkas la riskemulon. Plej grandan ĝuon li sentas, kiam li rezistas al la tento kalkuli nur pri bonŝanco, kaj enkondukas en la ludon nur la aŭtomatajn probablojn kalkulitajn laŭ la anoncoj, la jam prezentitaj kartoj, la matematikaj komparoj inter ĉiuj disdonitaj kartoj kaj sia propra enmana kartaro. Pliajn informojn povas ricevi la bona ludanto pere de psikologiaj analizoj: teknika forto de la kontraŭludantoj, iliaj gestoj... eĉ grimacoj, tonnuancoj de la voĉoj, iaj silentoj, movoj plej diversaj de la okuloj, de la manoj, de la fingroj, eĉ de la piedoj; ankaŭ la etoso, io en la atmosfero, preskaŭ fizike permesas kapti transdonojn de pensoj, de direktivoj, kiel pli simple signojn inter la kunludantoj.

Ĉu tiaj argumentoj ne devus instigi la gazedistojn doni al brig-maĉoj honorindan lokon en sportaj rubrikoj de gazetoj, radio-kaj televido-elsendoj?

El « Le Bridgeur » (La Brigisto)
tradukita de B. CHEVERRY.

ALVOKO :

Pro elĉerpiĝo de la libro de Dro. Ivo Lapenna « La Internacia Lingvo », kiu estis elektita kiel lerno libro en nia perkoresponda supera kurso, ni estas tre ĝenataj. Ni estos tre dankemaj al la geamikoj kiuj konsentos vendi al ni la ekzemplero(j)n (ne difektita(j)n), kiu(j)n ili posedas kaj ne deziras konservi.

Sendu vian proponon al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO
Kastelo Gresillon
BAUGÉ (M.-et-L.)
Francujo

Anton ĈEKOV

KARA HUNDO

(tradukita de Kofman)

Leŭtenanto Dubov, fervora militisto, kiu jam ne plu estis en sia floraĝo, kaj memvoĵulo Knaps, sidis kaj trinkis konjakon. « Perfekta hundo ! » diris Dubov montrante sian bojantan hundon Milko. « Rimarkinda hundo ! Atente rigardu ĝian buŝegon ! Nur rigardu tiun ĉi buŝegon, mi vin petas ! Se mi trovus ŝatanton, li certe donus ducent rublojn por la sola buŝego ! Vi ne kredas min ? Se vi ne kredas min, vi komprenas nenion. »

« Mi komprenas, sed... ».

« Ĝi estas sidhundo, pursanga angla setero ! Mirinda teniĝo ! Kaj la flarado ! Dio mia, kia flarado ! Ĉu vi scias kiom mi pagis por Milko, kiam ĝi estis ankoraŭ hundo ? Cent rublojn ! Neordinara hundo ! He, ĉi, Milkotripono ! Ĉi, malsaĝa Milko ! Tien ĉi, tien ĉi mia hundeto, mia huneĵo ! »

Dubov tiris al si Milkon kaj kisis ĝin inter la oreloj. En la okuloj de la leŭtenanto ekbrilis larmoj.

« Mi cin donos al neniŭ, mia belajo, mia kuraĝulo ! Ĉi amas min, Milko, ĉi amas min ? He for de mi ! » subite ekkriis li. « Kun la piedoj kotaj sur mia uniformo ! Jes Knaps, mi donis cent kaj kvindek rublojn por la hundeto. Mi nur bedaŭras, ke al mi mankas la tempo por ĉasi. La hundo pereas pro nenifarado. Ĝi entombigas sian talenton. Nur tial mi ĝin vendas. Aĉetu ĝin, Knaps ! Vi min dankados vian tutan vivon. Se vi ne havas sufiĉe da mono mi, por plaĉi al vi cedos por duono... Prenu ĝin por kvindek ! » « Ne, kara mia », diris Knaps kun sopiro ; « se ĝi almenaŭ estus de vira sekso, mi eble aĉetus ĝin ; sed... »

« Kio ? Milko ne estas de vira sekso ? Knaps, kion vi diras ? Milko ne estas de vira sekso ? Kio do ĝi estas laŭ via opinio ? Hundino ? Ha, ha ! La knabeto ne povas diferencigi virhundon de hundino ! »

« Vi parolas al mi kvazaŭ mi estus blindulo aŭ infano. Certege ĝi estas hundino ! »

« Nu, vi baldaŭ diros, ke mi mem estas virino ! Ha, Knaps ! Ĉu por tio vi faris la planan kurson de teknika lernejo ? Ne, mia kara ĝi estas vera kaj pursanga virhundo. Ĝi ombrus la plej belan hundon, kaj vi... ; ina sekso, ha, ha ! »

« Pardonu Mihail Ivanoviĉ, sed vi... vi rigardas min... malsaĝulo. Tio ne estas ĝentila... »

« Vidu tiun ĉi obstinulon ! Nu, iru al la diablo... Ne aĉetu ĝin ! Vi ne estas komprenigebla. Vi baldaŭ diros, ke tio ne estas ĝia vosto sed piedo... Mi ne petas vin aĉeti. Mi volas fari al vi komplezon, sed... Vahrameev, konjakon ! »

La servisto alportis trinkaĵojn. La amikoj pleniĝis siajn glasojn Pasis silenta duonhor.

« Hm... Se ĝi estas eĉ de ina sekso », diris la leŭtenanto maltracie rigardante la boteion. « Ĉu tio ne estas via propra profito ? Ĝi donos al vi hundidojn, kaj ĉiu hundido valoras kvin rublojn. Oni aĉetos ilin kun plezuro. Estas tute nekompreneble kial virhundoj pli plaĉas al vi. Hundino estas miloble pli preferinda. La ina sekso estas pli dankema, pli ligiĝema. Nu, se vi tiom timas la inan sekson, bone, mi ĝin donas al vi por dudek kvin rubloj. »

« Ne, ne, mia kara, mi donos nenion. Unue, mi ne bezonas hundon, due, mi ne havas monon. »

« He, tion ĉi vi devus diri antaŭ ĉio ! Milko ! For de ĉi tie ! »

La servisto alportis ovaĵon. La amikoj atakis ĝin kaj rapide malplenis ĝin la paton.

« Vi estas bona kolego, Knaps, brava homo », diris la leŭtenanto sekigante al si la lipojn. « Mi bedaŭras se mi estos vin tiel lasinte... Diablo ! Ĉu vi scias?... Prenu la hundon sen pago ! » « Sed kion mi faros, kun ĝi, karulo ? » diris Knaps kun sopiro. « Kiu ĝin flegos ĉe mi ? »

« Nu, ni lasu tion ĉi, mi ne persistas. Sed kien vi rapidas ? Restu ankoraŭ iom da tempo. »

Sed Knaps rektiĝis, oscedis, leviĝis kaj prenis sian ĉapon. « Estas tempo ; adiaŭ, » li diris.

« Atendu ; mi vin akompanos. »

Dubov kaj Knaps metis sur sin la supran vestaĵon, kaj iris sur la straton ? La unuaĵ cent paŝojn, ili silentis.

« Ĉu vi ne scias al kiu mi povus doni la hundon ? » demandis la leŭtenanto. « Ĉu ni ne havas konatojn ? La hundo estas, kiel vi vidis, belega, bonrasa, sed mi... mi ne tute bezonas ĝin ». « Ne mia kara... kiajn konatojn mi povus havi ĉi tie ? »

Ĝis la loĝejo de Knaps la amikoj diris nenian vorton. Nur en la momento, kiam Knaps ekpremis la manon de la leŭtenanto kaj malfermis la pordon, Dubov ekstus kaj diris maldecide. « Diru, ĉu la defelisto de tie ĉi akceptas hundojn ? » « Mi pensas, ke... jes... Sed mi ne scias tion kun certeco. » « Mi sendos ĝin kun Vahrameev, Ke ĝi iru al la diablo ! Mi ordonos ke oni ĝin defelu... Abo-mena hundo ! malbenita besto ! al ĝi ne sufiĉas malpurigi la ĉambron ; hieraŭ ĝi formangiis la tutan viandon l'anatemitano... Se ĝi ja estus de nobla raso... Bonan nokton ! » « Adiaŭ », diris Knaps.

La pordo ekkrakis, kaj la leŭtenanto restis sola sur la strato.

(aperinta en « Lingvo Internacia » 1900).

Pri fonetiko

KONTRAŬ NACIISMOJ

Unuatempe, Esperanto estis uzata preskaŭ nur skribe. Niaj personaj terrilatoj funkcis ĉefe per poŝtkartoj kaj leteroj. Ankaŭ ni legis gazetojn kaj librojn : ni praktikis la pasivan lingvon vide. Sed Zamenhof ĉiam rekomendis, ke ni ankaŭ parolu ĝin eĉ se inter nacie samlingvaj samideanoj, ĉar tia praktikado plej efike vivigas la lingvon.

Nuntempe, ĉiam pli ofte okazas esperantistaj kongresoj kaj renkontigoj de nacie malsamlingvaj gesamideanoj. Tial ni devas pretiĝi, kapabliĝi, por interparola uzado de nia lingvo, ni devas pli kaj pli dece, t.e. internacie, ĝin paroli kaj prononci, malpliligante la influon de niaj naciaj kutimoj.

La angloj per **we**, la francoj per **oui**, la kastiloj per **fui** montras, kiel ili diftongigas la vokalkombinon **ui** elparolante ĝin **ŭi**. La katalunoj, kontraŭe, ĝin prononcas **uj** : **cuina** (= **kujna**). Ni devas atenti, ke en Esperanto ĉiu vokalo estas forta, ĉiu memstara, aparte silabas, kaj tial **situi** estas trisilaba kaj **iu**, dusilaba. En multaj lingvoj i kaj u estas nomataj malfortaj vokaloj, kiuj funkcias kiel konsonantoj : respektive j kaj ŭ, eĉ se oni ilin nomas duonvokaloj aŭ duonkonsonantoj ; sed en nia lingvo ili estas fortaj, kiel universale fortaj **a**, **e**, **o**. Kaj se **teatraĵo** kaj **teoremo** estas kvarsilabaj, ankaŭ **februaro** kaj **postulo** aŭ **dialogo** kaj **idioto** havas kvar silabojn. Jen alia ekzemplo : rimarku la diferencon inter la unua **e** de la germaaj vortoj **essen** kaj **lesen** — antaŭ la senvoĉa **ss** ĝi estas mal-

longa, kaj antaŭ la voĉa **s**, longa ; en Esperanto ni devas same elparoli **e** ce **meso** kaj **mezo**. En angla, **live** havas mallongan i kaj **leave**, longan i por **ea**.

Mil ekzemploj povas montri la influon de ĉiu nacia lingvo kontraŭ la deca prononcado de Esperanto. Ordinare, tia influo ne malpermesas la esperantistaran interkompreniĝon. Tamen, ni devas iom post iom ĝin eviti, ne nur por pli facila interkompreniĝo, sed por atingi mezan, unuecan, universalan Esperanton, tiel ĉe verkado kiel ankaŭ ĉe parolado.

Nuntempe ekzistas ne nur legaĵoj por nia perfektigado, sed ankaŭ fonografaj diskoj kaj sonbendoj, krom la internaciaj kunvenoj, por nia aŭda kaj parola lernado. Ni ja devas ĉiel lerni kaj ellerni la internacian lingvon.

Ĉi-okaze, ni rimarkigis nur du prozodiajn makulojn kontraŭ pura supernacia Esperanto : diftongadon kaj longecon de vokaloj. Sed ekzistas miloj da tiaj eraretoj en la senfina fonetiko de nia lingvo, kiujn ni devas forigi. Kaj ne nur en la fonetiko, sed en la tuta gramatiko. Tamen, la miraklo de Esperanto havigis al ni iam grandajn oratorojn, poetojn, verkistojn el plej diversaj landoj. Kaj tiu miraklo pravigas samtempe nian universalan aserton, ke Esperanto estas facila, regula, logika vivanta lingvo.

Delfi DALMAU,
membro de la Akademio.

Skribita de geknaboj

NIA RESTADO EN GRÉSILLON

Ĉu vi volas scii ion pri nia vivo en Grésillon ? Do legu bone la sekvajn liniojn.

Sinjorino Vincent gvidis nian kurson po du fojoj ĉiutage, tamen ni ĝuis sufiĉe da libertempo por fiskaĵi kaj nin bani, kiam la vetero estis bela. Ni promenis kelkfoje tra la arbaro aŭ ludis tablotenison. Vespere ni rigardadis filmojn aŭ kantis, aŭ ludis. Iu Nederlandano ĉeestis en Grésillon. Li alvenis per skuto.

Dum nia unua vespero ĉi tie ni estis tre feliĉaj vidi la unuan Esperantlingvan filmon : « Angoroj ». La kreinto Sinjoro Mahé plene sukcesis starigi nian harojn ! Dum nia restado okazis la kunveno de la UFE-komitato. Ni estis tre kontentaj pri nia restado vaj multe dankas la organizantojn de la kastelo kaj ni diras :

« Ĝis la revido, Grésillon ! »
ROUEN Jean-Pierre, 16 jara knabo kaj.
GRAFFIN Marie-Gabrielle, 15 jara knabino.

POR VIA DISTRO

NIA KONKURSO 1964-65

Nun komenciĝas nia nova konkurso, kiu daŭros dum kvar numeroj de Kulturaj Kajeroj. Ni atentigas vin, ke nur abonintoj rajtas partopreni la konkurson. Konkursontoj bonvolu kunsendi, almenaŭ unufoje, la banderolon de la revuo kun siaj respondoj.

Ni petas vin sendi viajn respondojn antaŭ la fino de la monato sekvanta tiun de la aperigo de la revuo, do por la hodiaŭaj problemoj antaŭ la fino de Novembro.

En ĉiu numero de la revuo, la konkurso konsistas el du problemoj, preskaŭ ĉiam gramatikaj (por respondi al la deziro de la plimulto el la antaŭjaraj konkursintoj. Nur tiujn du problemoj vi devas respondi, kaj tute ne la amuzajn problemojn kiuj staras aparte de la konkurso. Sendu viajn respondojn al :

S-ro P. CHEVALIER

19, bd G.-Lauriol, Nantes (L.-A.) Francio

Kaj ne forgesu precizigi viajn nomojn (S-ro, S-ino aŭ F-ino) kaj adresojn. Kaj nun, bonan kuraĝon !

La du premioj konsistas el :

dusemajna restado en la Kulturdomo
unusemajna restado en la Kulturdomo.

Tiujn restadojn la gajnintoj povos ĝui ĉu en 1965, ĉu en 1966. La gajnintoj de la du antaŭjaraj konkursoj ne rajtas partopreni.

UNUA PROBLEMO

En la ĉisuba anekdoto bonvolu anstataŭigi la

punktojn per la taŭgaj vortoj. Estos kalkulitaj 2 poentoj por ĉiu vorto ĝuste trovita, kaj forprenita 1 poento por ĉiu vorto malĝuste elektita.

Akvo, Fajro kaj Reputacio

... tagon, Akvo, Fajro kaj Reputacio kune vojaĝontaj interkonsiliĝis... la maniero, laŭ kiu ili povos retroviĝi se okaze... perdiĝos. Fajro diris : « ... vi trovos min, kie vi vidos fumon ». Akvo diris : « ... mi estos, kie ekzistas marĉoj ». « Kaj vi » ili demandis Reputacion, « ... oni trovos vin ? » « ... , respondis tiu ĉi, ... oni perdis, ... retrovas » !

DUA PROBLEMO

En iuj el la subaj frazoj estas eraraj vortoj. Bonvolu korekti ilin. Du poentoj estos donitaj por ĉiu eraro ĝuste korektita, kaj unu poento forprenita por ĉiu eraro aldonita.

— Manĝonta la fiŝon kaptatan, mi estis tre kontenta ; manĝanta la kaptitan fiŝon mi estis malpli kontenta, kaj manĝinta ĝin, mi estis tute malkontenta, ĉar ĝi estis malbona kaj ni malsaniĝis.

— Bongustaj fruktoj estas manĝotaj pli volonte de la infanoj ol viando aŭ legomoj : ili estas tre baldaŭ manĝotaj.

— Biero mi ne plu povas doni al vi, ĉar ĝi estas jam tute trinkata de la laboristoj.

— En somero la bone biero estas rapide trinkota.

— Ĉu la pordoj estas fermataj ? Jes, sinjoro, ili estas fermataj de la servisto ĉiuvespere je la deka.

AMUZAJ PROBLEMOJ (ekster la konkurso)

Solvoj de la lastaj problemoj :

Sescifera nombro. — Estu nekonataj nombroj : a, b, c, d, e. La nombro skribiĝas : 1 abcde. La alia nombro skribiĝas : abcde 1. Por ke la nombroj estu identaj necesas ke : a = 1. Nu, a = b, do b = 1. Same necesas ke b = c = 1. Tute same : c = d = e = 1. Do, le nombro estas : 111 111.

Algebra solvo. — Estu « x » la nombro formita per la 5 ciferoj starantaj dekstre de 1. La nombro skribiĝas : 100.000 + 1. La dua nombro estas : 10 x + 1. Ni skribu : 100.000 + x = 10 + 1. Do : 99.999 = 9 x ; x = 99.999 = 11 111.

9

Eraroj trovataj. — Jen la 8 eraroj : fumo el la pipo ; butonoj ĉe la ĉemizoj de la caristo ; anso de la laktujo ; radradio ; pavimero, dekstre ; rimeno sur la selo ; hufo de la azeno ; nazego de la azeno.

NOVA PROBLEMO (S-ro Salasc)


Sak-enigmo : tiu ŝakenigmo kaŝas frazon el iu ferakonto de Zamenhof. La solvo estas trovebla laŭ la movo de la ĉevalo sur la ŝaktabulo.

NO	DO	FLO	VOR	KE	ĈIU
AU	TO	CON	DI	RO	
NA	ŜTO	VI	ĈE	MI	MUL
KI	OS	VI	AŬ	ROS	BU
TA	AL	EL	VIA	TE	FA
IR	UN	KOS	RAS	ŜO	EL

Gramatiko per Bonhumoro

La prepozicio « KROM » antaŭ iu vorto signifas, ke tiu vorto staras ekster la temo de nia parolo, ke ni rigardas ĝin kiel ion apartan ; tial ĝi povas havi egale bone la sencon de escepto kaj la sencon de aldono, depende de la cirkonstancoj, en kiuj ĝi estas uzata. « KROM » per si mem esprimas nek escepton, nek aldonon, ĝi esprimas nur apartigon ; sed ĉu tiu apartigo estas farata por ion forigi, aŭ kontraŭe, por ĝin pli akcenti, tion montras la senco de la frazo mem... Kompreneble la vorto « KROM » povas iufoje kaŭzi neprecizecon aŭ malkompreniĝon ; sed en tiaj okazoj ni devas eviti la vorton « KROM » kaj uzi anstataŭ ĝi la pli precizajn esprimojn « esceptinte » aŭ « ne sole, sed ankaŭ ».

L.L. Zamenhof - Lingvaj Respondoj.



— Mi ŝatas ĉiujn sportojn, krom flugado.
(Pli bone : esceptinte flugadon).



— Patrino estas tre ŝparema. Ŝi ĉiam pensas pri ĉiuj utiligoj de io ajn, krom pri la plej surprizaj !

(pli bone : ankaŭ pri la plej surprizaj)



— Ŝajnis al mi, ke ni forgesis ion. Ni pensis pri ĉio, krom la aŭtomobilo ! (la senso estas sufiĉe evidenta).

Niaj perantoj

- Aŭstrio** : S-ro Johan Wieshofer, Wiener-Reichstrasse 2, LINZ (28 aŭst. ŝil.).
- Belgujo** : S-ro Guyot Mateo, 18, rue Chefneux, BARCHON, Lg. (50 fr.).
- Britujo** : S-ro Frank Ashpole, 127 Midford Rd, Combe Down, BATH (7 ŝil.).
- Ĉeĥoslovakio** : S-ro Dezidero Koronczi, Bana Cigel, PRIEVIDZA.
- Nederlando** : S-ro M. de Waard, Anemoonstraat, Capelle aan den IJssel, ZH pĉk : 209721 (3,5 guld.).
- Germanujo (Okc.)** : S-ro Joseph Bode, (16) KASSEL-Ndzw, Silberbornstr, 33 - pĉk : Frankfurt (M) : 234-759 (4 mark).
- Germanujo (DDR)** : S-ro Ernst Muthschall, 19a HALLE (Saale), Am Bergmannstrost 18 - pĉk : Leipzig 510-28 (6 mark).
- Hispanujo** : Jozefino Monter Palomar, Muntaner 416, 1^a, 1-a, BARCELONO (55 pes.).
- Italujo** : S-ro Claudio Pontedera, Via Marco Polo 3A, Verona (600 liroj).
Itala Esperanto-Federacio, Via Po 7, TORINO.
- Jugoslavio** : Slovenia Esp. Ligo, Komŝenska 7, LJUBLJANA, Poŝtfako 239 (900 d.).
- Norvegujo** : S-ino Marit Delor, Oberst rodes veg 56, LAMBERTSEDER (7 kr.).
- Danlando** : S-ino Bodil Neergaard, Gothersgade 158, KOPENHAGO K (7 kr.).
- Pollando** : Asocio de Esperantistoj en Pollando, Nowy Swiat 27, VARSOVIO (36 zlotoj).
- Svedujo** : S-ro R. Dupuis, Helgagatan 36, uppg 13, STOCKHOLM Sö, Postgiro : 157007 (6 kr.).
- Svilando** : Provizore vakas (Sendu viajn abonojn al la franca adreso).
- Usono** : S-ro C.S. Otto, 32 Hazelwood Rd., Bloomfield (N.J.) (1 dol.).
- Aliaj Landoj** : Ni serĉas perantojn en aliaj landoj. Oni povas pagi la abonprezon per steloj (14 st.), aŭ respondkuponoj (10 respk.), per libroj, aŭ per neuzitaj poŝtmarkoj. Sin turni al S-ro Micard, Epineux-le-Séguin (Mayenne), Franc.



KASTELO GRÉSILLON

BAUGÉ
Maine-et-Loire
FRANCUJO

ESPERANTISTA KULTURDOMO

De junio ĝis septembro ĉiulandajn esperantistojn kaj eventuale iam ajn karavanojn frue anoncintajn

Akceptas :

- Por ripozi trankvile en atmosfero frateca ;
- Por eklerni aŭ plilerni la internacian lingvon ;
- Por ĝin praktiki per interŝanĝo de ideoj ;
- Por aŭdi kulturajn prelegojn ;
- Por studi specialajn problemojn ;
- Por inter amikoj gaje libertempi ;
- Por ekskursi tra centr-okcidenta Francio.

venu al la ESPERANTISTA KULTURDOMO

Kompleta Programo kun kondiĉoj havebla kontraŭ internacia respondkupono al :

ESPERANTISTA KULTURDOMO, Grésillon, BAUGÉ (Maine-et-Loire) Francujo